# *Díaz-Canel akceptis la prezidanton de la ?ina Kunlabora Agentejo*

Image not found or type unknown

**Díaz-Canel (D) priskribis la viziton kiel tre signifa. Foto: Studio Revolucio**

Havano, apr 5 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, akceptis ?i-?a?de Luo Zhaohui, prezidanton de la ?ina Internacia Disvolva Kunlabora Agentejo (CIDCA kaj la akompanan delegitaron.

La vizitantoj transdonis koran saluton de la ?enerala sekretario de la Komunista Partio de ?inio, Xi Jiping, al la kuba prezidento kaj al la gvidanto de la Revolucio, armea generalo Raúl Castro Ruz.

Siaflanke, Díaz-Canel priskribis la viziton kiel tre signifa ?ar "?i plifortigas la tre pozitivan taksadon, kiun ni havas, kaj politike kaj praktike, pri la konsento, kiun ni atingis kun la kara prezidanto Xi Jinping en la

renkonti?oj kiujn ni havis en lastaj jaroj."

Elstarigante la da?ran subtenon de la ?ina Popola Respubliko (PRC) al Kubo, la eminentulo transdonis sian dankemon al la Partio, Registaro kaj  ?ina popolo, anka? pro ilia batalo kontra? la blokado, kiun Usono trudas al ni dum pli ol 60 jarojn.

La ?tatestro ratifis la inviton faritan al sia ekvivalento viziti la kariban nacion, kaj petis transdoni al la ?ina gvidanto "la plej amajn salutojn el Kubo".

Luo Zhaohui siaflanke emfazis, ke amba? landoj estas proksimaj kunuloj, bonaj amikoj kaj anka? gravaj partneroj. "Ni formas komunumon kun socialisma estonteco," li aldonis.

Li klarigis la intensan tagordon, kiun li ekplenumis en Kubo, ekde la unua momento, kiu  "ebligis tre proksiman komunikadon kun la diversaj Ministerioj, por da?re anta?enigi kaj akceli la specialajn rilatojn de amikeco inter la du nacioj, kiel same profundigi ilin e? plu.

La ?ina delegitaro konsistas el ambasadoro Ma Hui, kamarado Huang Yan, membro de la Partia Gvida Grupo, Ministerio pri Agrikulturo kaj Kamparaj Aferoj; CIDCA-oficuloj Bai Bin kaj Meng Ran, kaj Zhu Xingyu, vicdirektoro de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj.

Je kuba flanko, la membro de la Politika Buroo kaj ?efministro, Manuel Marrero Cruz, la Vic?efministro kaj estro de Eksterlanda Komerco kaj Eksterlanda Investo, Ricardo Cabrisas Ruiz, kaj la Ministroj, Ydael Pérez Brito, de Agrikulturo; Vicente de la O Levy, de Energio kaj Minejoj; kaj Eloy Álvarez Martínez, de Industrio.

Fonto: www.presidencia.gob.cu

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/351449-diaz-canel-akceptis-la-prezidanton-de-la-cina-kunlabora-agentejo

Radio Habana Cuba